«Le Groupe Esperanto du Maine» salutas vin !

Bonvenigaj vortoj

«Ni ne heredas la teron de niaj prapatroj, ni pruntèprenas ĝin de niaj infanoj.»

Antoine de St Exupéry

Enhavo

Ekstremaj veterokazaĵoj	p. 1.
Recenzo de verko de Thomas Creusot (Espéranto et espérantisme en France)	p. 2.
Poezia angulo : Eta pomo	p. 4.
Grandega katastrofo en Tibeto.	p. 5.
Loka specialaĵo : Pomoj kun cidro	p. 7.


Kreskantaj ekstremaj veterokazaĵoj

Tutmonde, la GIEC* prognozas — kun alta grado de certeco — pliiĝon de la ofteco kaj intenseco de varmondoj aŭ varmopintoj, malkreskon de malvarmperiodoj, kaj intensiĝon de precipitaĵo kaj vaporiĝo. Iuj ekstremaj eventoj iĝas pli oftaj aŭ intensaj, kaj eĉ povas kombiniĝi.

* GIEC: Groupe d'experts intergouvernemental sur l'évolution du climat (Interregistara Spertularo pri Klimata Ŝanĝiĝo)


La pli trafitaj landoj

Rilate al la nombro de katastrofoj por la periodo 2000-2019



Thomas Creusot ***Espéranto et espérantisme en France (L'utopie en pratique)*** Paris, Perrin, oktobro 2025, p. 363. 27 euroj.

Estas tre interesa libro ĉar la aŭtoro (1996) priskribas Esperanton kiel historiisto-sociologo, sen lingvaj antaŭjuĝoj kaj sen zorgo por prezenti kaj diskonigi ĝin. Ankoraŭ alia avantaĝo, Thomas Creusot konsideras neŭtrale sinjoro Beaufront (reala nomo: Chevreux, guvernisto, tio signifas persono kiu scias direkti aliajn homojn) kaj sinjoro Zamenhof. Por Thomas Creusot, ili estas du personoj kiuj celas, nur unuavide, la saman aferon. Sekve ni vidas la ŝlosilan rolon de Beaufront, pere de multaj konferecoj, artikoloj favore al la artefarita lingvo esperanto, pli efika ol volapuko, kiu, tamen, montris la grandan esperon por posedi unu internacian lingvon anstataŭ du (anglan kaj germanan) aŭ tri (anglan, francan kaj germanan) por la homoj de ne franca lingvo).



Fakte, Beaufront direkte trafis la eliton de la franca socio « tiuj, kiuj pro la komerco, la industrio, la financo, la amo de kolektoj aŭ la emo vojaĝi, la sciencoj tiel bone kiel la artoj ligas konstante kun eksterlandanoj. » (pp. 39-40). Beaufront, en sia traduko de *Unua libro* de Zamenhof, transformis la dek kvar paĝojn de la originala verko en cent sepdek! Beaufront emfazis sian celon kaj, samtempe, perfidis Zamenhof ĉar la esprimo « universala lingvo » estas trompa « tute ne implicas, ke necesas disvastigi ĝin al la sovaĝuloj, barbaruloj, niaj kamparanoj[1], kaj al ĉiuj kiuj ne bezonas ĝin ». (p. 39)

Male, Zamenhof provis samtempe varbi esperanton (eble oni troigas la malsamecon inter li kaj Beaufront en tiu momento) al majstroj kaj al laboristoj, al saĝuloj kaj al analfabetoj, en la universo.

La rezulto de la laboro de ambaŭ, en Francio, estis granda sukceso!

La eldonejo *Hachette*, la plej grava de la mondo, en la epoko, eldonis en 1909 tricent mil da ekzempleroj de *Premier manuel de la langue espéranto*, skribita de Karlo Bourlet; dudek ses mil en 1907 de *Vocabulaire Français-Espéranto* de Cart, Merckens kaj Berthelot. (p. 64). Pro tio, E.o estis en la reklamoj de multaj butikoj, en komercaj foiroj, en la organismo « Touring club de France », tre fama tiam, en la turismaj prezentoj de francaj provincoj kaj monumentoj, en 91 hoteloj en 1914 (p. 59) , ktp, ĝis la jaroj 1930.

Danke al E.o, la instruistoj kaj pedagogoj celas konkretajn resultojn, per laktiva ago de la lernantoj, sen la uzo de la traduko al la franca lingvo, kio estis kutima. Estas la natura metodo, la libero de la esprimo de la lernantoj helpe de muraj pentraĵoj aŭ bildoj de la taga vivo por ke la lernantoj improvizu frazojn (pp. 94-95).

1 Descartes (Kartezio), en sia letero al pastro Mersenne (erudiciulo, naskita en departamento Sarta kaj instruita en Le Mans) en 1629, imagas, en la projekto de nova lingvo, ke tiel “la kamparanoj povus pli bone pripensi la veron de la aferoj, ol nun faras la filozofoj.” Kartezio –kaj eble Zamenhof ne konsideris, ke la kamparanoj estas sovaĝaj aŭ barbaraj, kiel oni opinias kutime, ĉar ĉiuj homoj, nun sur la planedo, havas kamparanajn praulojn…

La intensa laboro en Francio permesis paroli pri Esperanto en Francio «à la française» kaj asertis kun la konata esperantisto Théophile Cart: «Ĉiuj, eksterlandanoj kaj francoj, ĉiuj kaj ni, francoj, estas lernantoj de sinjoro Beaufront.»

La rapida disvolviĝo de E.o starigis la problemon de novaj vortoj ne nur en la sciencoj, medicino, ktp. Krome, kelkaj esperantistoj pensis, ekde 1908, plibonigila lingvon pere de alia nomita «ido» (la bebo, la infano), kiu signifas kaj indikas la familian ligon inter la esperanta lingvo kaj la ida lingvo.



Tute male, Zamenhof kaj siaj sekvantoj, Beaufront kaj siaj sekvantoj iniciatis senfinan militon. Fakte, Thomas Creusot prezentas la lingvajn argumentojn de Ido sed mi opinias, ke ili estas tute nekompreneblaj pro manko de konkretaj ekzemploj[2]. Krome, E.o «neniomgrade bezonas iujn aŭtoritatajn regulirantajn institucioj̆n, [...] la lingvo plej libere evoluos sur bazo de nura kolektivisma kreado.»[3]

La kongreso en Boulogne ĉe maro en 1905 spegulas la strecon inter Zamenhof kaj Beaufront en la « Deklaracio pri Esperantismo ». Doni «al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝi inter si, [...] E.o povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj» eltiraĵo de punkto ‶1″ kiu respondas al la vidpunkto de Zamenhof: Esperanto ties interna ideo estas kiel pordo por eneri eblan religion de la Homaro. Tamen, «Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas. » Unua frazo de la lasta punkto, la cifero 5, respondas al la ideo de Beaufront: Esperanto estas ĉefe por la socia elito de riĉuloj, sen videbla politika partio (pp 147-149).

Dum la unua mondmilito Esperanto servis egale la francan ĉovinismon kaj la germanan ŝovinismon. La pastro Emile Wetterlé, prenante la leteron de Descartes al Mersenne en 1629 kuj laŭdante ian artefaritan lingvon, asertis, per klara ŝovinismo, ke « la ideo de helpa lingvo estas franca ideo » (p.140). Tamen la aŭtoro rimarkas, ke kiam la franca lingvo (komence de la 20-a centjaro) estas en konkurado kun la angla, eble, Esperanto evitus la aperon de la germana lingvo (p. 133). Alia franca ŝovinisto parolis pri la esperanta traduko de francaj verkoj kiuj instigis al la legantojn « pensi kiel franco », kaj pro « la belecoj de la formo kiu portas tiujn ideojn spronis ilin « lerni francan lingvon » (p. 135) Julien Guadet, 1929, conferenco en la pariza « Sorbonne ». (daŭrigota)



2 Fakte, la matematikisto Louis Couturat «alkutimiĝinta al matematike ekzakta pensado, ne trovis unuformecon en la reguloj de la Esperanta vortoderivado. […li] preterlasis konstati, ke Esperanto simile al la plimulto de lingvoj naturaj, en sia vortoderivado orientiĝas ne tiom laŭ la postuloj de la absoluta logiko, kion laŭ la postuloj de simpleco kaj klareco.» Drezen *Historio de la mondolingvo (trijarcentoj da serĉado)*, Oosaka, Pirato, p. 183.

3 Drezen, o. c., p. 185.

Poezia angulo

Eta pomo



La eta pomo enuas
Ĝi ankoraŭ ne estas plukita.
La dikaj pomoj foriris.
Eta pomo estas sen amiko.

Kiel malvarmas en tiu aŭtuno,
Mallongas la tagoj, tuj pluvos.
Kiel oni timas en la nigra fruktoĝardeno
Kiam oni estas sola kaj oni estas pomo.

Mi ne plu eltenas, venu pluki min,
Vi venas pluki min, Isabela.
Ha ! Kiom malĝoja estas maljuniĝi
Kiam oni estas pomo kaj ankaŭ bela !

Prenu min delikate en via mano
Lasu min ŝrumpi
Agrable varme sur via kamenbreto
Kaj vi manĝos min morgaŭ.

Geo Norge

Norge, la pseŭdonimo de Georges Mogin — naskita la 2-an de junio 1898 en Molenbeek-Saint-Jean (Bruselo) kaj mortinta la 25-an de oktobro 1990 en Mougins (Alpes-Maritimes) — estis franclingva belga poeto.



Grandega katastrofo en Tibeto.

« Hieraŭ ĉe ni okazis grandega katastrofo. La rivero Bhotekoshi, kiu elfluas el Tibeto, estis blokita de granda terglito kaŭzita de la neĝo kaj degelo. Samtempe okazis eta tertremo kun magnitudo de ĉirkaŭ 4,5. Oni ankoraŭ ne klare scias, ĉu la tertremo kaŭzis la tergliton aŭ ĉu la moviĝo de la terglito mem kaŭzis la tremadon de la tero.

Post kiam la rivero estis blokita, formiĝis granda lago. La akvo ne povis longe resti en ĝi, kaj fine la digo cedis. Grandega kvanto da akvo kun granda forto fluis malsupren al la nepala flanko. Laŭ kelkaj informoj, la akvonivelo atingis eĉ ĉirkaŭ 200 metrojn.

La rivero Bhotekoshi fluas tra Nepalo dum ĉirkaŭ 150 kilometroj, kaj laŭ tiu tuta vojo okazis grandegaj detruoj. La regiono estas tre grava turisma loko. La fama celo de piedvojaĝantoj, Langtang, troviĝas en tiu regiono. Ankaŭ la 15-a Internacia Himalaja Renkontiĝo de NEspA okazis tie. Ni tiam restis en Syabrubesi, sed nun ni aŭdis, ke tiu hotelo estis forlavita de la inundo. Ŝajnas ankaŭ, ke la posedanto de la hotelo estas inter la malaperintoj.

Laŭ la nunaj informoj, miloj da homoj eble estas malaperintaj, kvankam la ĝusta nombro ankoraŭ ne estas konata. En tiu regiono troviĝas ankaŭ gravaj pilgrimejoj, interalie Gosaikunda, sankta lago en la Himalajo, kaj la regiono de Monto Kailash kaj Manasarovar en Tibeto.

Multaj pilgrimantoj, kiuj vojaĝis al Manasarovar en Tibeto, devis veturi laŭ tiu rivero dum ĉirkaŭ 100 kilometroj. Laŭ la nunaj informoj, granda parto de tiuj pilgrimantoj estas malaperintaj. Laŭ la nuna statistiko, ĉirkaŭ 600 pilgrimantoj estas ankoraŭ serĉataj. Ankaŭ estas multnombraj turistoj el diversaj landoj, sed la plej multaj estas el nia najbara lando, Barato.

Ĉiuj vilaĝoj kaj urbetoj laŭ la rivero Bhotekoshi estis grave trafitaj de la inundo. Ĝis nun oni trovis ĉirkaŭ 600 kadavrojn. Multaj homoj ŝajne mortis pro la grandega forto de la akvo, kiu portis kun si grandajn ŝtonojn, sablon kaj aliajn materialojn. Pro tio multaj el la trovitaj kadavroj estis grave difektitaj.



Multaj lernejoj, vilaĝoj, elektrocentraloj, pontoj, agrikulturaj kampoj, policaj oficejoj kaj doganaj oficejoj estis detruitaj aŭ forlavitaj. Tiu vojo estas la ĉefa konekto inter Nepalo kaj Ĉinio por kulturo, religio, turismo kaj komerco. Ankaŭ granda nombro da aŭtoj importitaj el Ĉinio estis forportita de la inundo.

La informoj el la tibeta flanko venis iom malfrue. Pro tio multaj homoj en Nepalo nur ekvidis la danĝeron kiam la inundo jam komenciĝis. En la pli malaltaj lokoj oni tamen avertis la loĝantaron,

sed multaj homoj ne kredis la avertojn, ĉar ili ne povis imagi, ke la inundo estos tiel grandega. Krome, tiutempe eĉ ne pluvis, kaj pro tio la homoj ne atendis tiel grandan katastrofon.

Antaŭ du jaroj okazis inundo en la sama regiono. Ĝi ankaŭ kaŭzis multe da damaĝoj, sed ĝi estis multe malpli granda ol la nuna katastrofo.

Ĉi-foje la temperaturo estis nekutime alta. Pro la varmo okazis degelo, kiu eble kontribuis al la terglito. La terglito blokis la riveron kaj formis grandan lagon. La lago ne povis reteni la grandegan kvanton da akvo, kaj fine ĝi rompiĝis, liberigante grandegan akvokvanton malsupren laŭ la rivero.

Hodiaŭ mi proponis al mia kolegio kolekti helpon por la viktimoj. Ni jam kolektis ĉirkaŭ 500 usonajn dolarojn kaj aldonis ilin al la fonduso de la Ĉefministro por helpi la viktimojn. Ni ankaŭ planas kolekti monon nome de Nepala Esperanto-Asocio kaj kontribui al la helpo por la viktimoj de tiu grandega katastrofo.

Tiuj, kiuj volas helpi, bonvolu skribi al mi. Mi kolektos la tutan sumon kaj poste transdonos ĝin al la koncerna fonduso aŭ helpkomisiono. Ni fidas je la nuna registaro kaj esperas, ke ĝi faros ĉion eblan por helpi la viktimojn kaj rekonstrui la detruitajn regionojn.

NEspA estis fondita laŭ la kondiĉoj de la nepala registaro. Tial estas nia devo helpi la registaron kaj la popolon en tia malfacila situacio. Kiam ni renovigas nian asocion, ni devas raporti ankaŭ pri nia socia laboro. Do, por plenumi nian respondecon kaj montri nian solidarecon, NEspA decidis kolekti monon kaj kontribui al la helpo por la homoj, kiuj perdis siajn familianojn, hejmojn kaj vivrimedojn. Multaj familioj perdis plurajn membrojn, kaj multaj aliaj homoj estas vunditaj.

Mi daŭre informos vin pri la situacio, kiam mi ricevos pli da fidindaj informoj.

Kore, »

Bharat



Ps. Laŭ la ĝisnunaj informoj, neniu membro de NEspA estas viktimo de la katastrofo. Tamen ni devas ankoraŭ atendi, ĉar la situacio ne estas plene klara. En Nepalo estas multaj esperantistoj, kaj ne ĉiuj estas membroj de NEspA aŭ aktivaj membroj. Krome, nun estas periodo de religiaj festoj, kaj pro tio ni eble bezonos iom da tempo por kontakti ĉiujn kaj kontroli, ĉu ĉiuj estas en ordo.

Loka specialaĵo : Pomoj kun cidro



Por ses personoj, necesas:

- 1 kilogramo da pomoj
- 10 sukeropecoj
- 25 g da butero
- kvaronlitro da cidro
- iom da vanilpulvoro
- 100 g da freŝa kremo
- 100 g da kazeo
- 2 ovoj
- 50 g da sukerpulvoro

Ŝenŝeligu la pomojn kaj dike pecigu ilin.
Metu ilin en buteritan bakpladon.
Varmigu la cidron en kaserolo
kun dek sukeropecoj
kaj iom da vanilpulvoro.

Poste verŝu la cidron sur la pomojn.
Dum 30 min baku la miksaĵon
en mez-temperatura forno (220 celsiaj gradoj).

Dume, rompu la ovojn kaj kirlu ilin
en granda bovlo kun sukerpulvoro.
Aldonu la freŝan kremon kaj la kazeon.
Bone miksu.

Kiam la pomoj estas kuiritaj,
elfornigu la pladon.
Atentu! Ne brulvundiĝu!
Verŝu la kreman miksaĝon sur la pomojn
kaj reenfornigu la tuton dum pliaj 20 minutoj.



En la gazeto 1994, 3ª trimonato

Le G.E.M (Groupe Espérantiste du Maine) a été créé en mai 1991 ouvrant son horizon au département de la Mayenne. Il a modifié récemment son intitulé et se nomme depuis « Le Groupe Espéranto du Maine ».

La GEM (Majna Esperantista Grupo) estis kreita en majo 1991, vastigante siajn horizontojn al la departemento Mayenne. Ĝi ŝanĝis sian nomon kaj de tiam nomiĝas "La Majna Esperantista Grupo".